# Fabloj de Cent paraboloj

**Esperantigis Miaohui**

**Voĉlegis Zhao Jianping**

**Ilustris Studentoj el Movbilda klaso 2006,**

**Profesio-eduka Centro, Shaoxing**

**ĈBRE**

**(Ĉina Budhana Retejo Eseprantista)**

**http://www.ebudhano.cn**

**miaohui@ebudhano.cn**

## Enhavo

1. Manĝado de Salo ... 6
2. Lakto por Festeno ... 7
3. Vundiĝo pro Piroj ... 8
4. Malĉastulino kaj Ŝia Edzo ... 9
5. Trinki Akvon el la Rivero ... 10
6. Malsaĝulo kaj Lia Mortinta Filo ... 11
7. Fratiĝo nur por Mono ... 12
8. Ŝtelisto kaj la priŝtelaĵo ... 13
9. Laŭdo al la Patro ... 14
10. Konstruigi Trietaĝan Domon ... 15
11. Antaŭvido de la Bramanano ... 16
12. Malvarmigi Bolantan Akvon ... 17
13. Koleremulo ... 18
14. Komercistoj kaj ilia Gvidisto ... 19
15. Medicinaĵo Rapide Kreskiga ... 20
16. Plidolĉigi Sukerkanon ... 21
17. Kvarcent Moneroj por la Kvindek ... 22
18. Proksimiĝo al la Akrilo ... 23
19. Serĉadi la Perditan Bovlon ... 24
20. La Reĝo kaj la Mispunito ... 25
21. Deziro por Pliaj Filoj ... 26
22. Elvendi Kalambakon ... 27
23. Ŝtelisto kaj la Ŝtelitaj Silkaĵoj ... 28
24. Semi Rostitan Sezamon ... 29

25. Akvo kaj Fajro 30
26. Gajni Favoron de la Reĝo 31
27. Metodo por Kuraci Vundon 32
28. Pliĉarmigi la Edzinon 33
29. Klopodo por Plej Valora Vestaĵo 34
30. Edziĝo de la Paŝtisto 35
31. "Kapabla Azeno" 36
32. Ŝtelita Oran Ingoton 38
33. Haki Arbon por Preni Fruktojn 39
34. Mallongigi la Vojon 40
35. La Hazardaj Trezoroj 41
36. Restigi la Feon 42
37. Mortigi la Restajn Bovojn 43
38. Trinki Akvon el la Ligna Tubo 44
39. Ŝmiri la Domon 45
40. Sufero de la Kalveco 46
41. Kverelo inter Du Demonoj 47
42. Protekti la Kamelan Felon 48
43. Granda Ofero por Bagatelaĵo 49
44. Satiĝo pro la Duona Kuko 50
45. Gardi Pordon 51
46. Serĉi Gruntbovon 52
47. Imiti Birdan Grakadon 53
48. Besto kaj Arbo 54
49. Diskutado pri la Trovitaj Haroj 55
50. Kuraci la Ĝibon 56
51. Kuna Servistino 57


52. Amuzisto kaj la Reĝo 58
53. Reciproka Venĝo 59
54. Kapo kaj Vosto 60
55. Lojala Subulo 61
56. Postulado al "Nenio" 62
57. Flati la Prestiĝulon 63
58. Dividi la Heredaĵon 64
59. Rigardi la Botelfaradon 65
60. Ombro de Oro 66
61. La Kreaĵo de Brama Disĉiplo 67
62. Manĝi Fazanaĵo por Resaniĝo 68
63. Terurigo pro la Kostumo de Demono 69
64. Luktado kun la Imagita Diablo 70
65. Kvincent Kneloj 71
66. Reciti Stirmetodon 74
67. La Lasta kuko 75
68. Sin Venĝi 76
69. Rapida Manĝado 77
70. Gustumi Mangojn 78
71. Blindiĝo pro la Edzinoj 79
72. Buŝo da Milio 80
73.Mensogo pri la Ĉevalo 81
74. Evito de Puno 82
75. Perdo de Ambaŭ Urno kaj Kamelo 83
76. Aspiro al la Reĝidino 84
77. Melki Virazenon 85
78. Hastema Filo 86

79. Porti Benkojn por la Reĝo 87
80. Klistero 88
81. Venĝo Kontraŭ la Urso 89
82. Semi Tritikon 90
83. Venĝo de Simio 91
84. Bati Hondojn pro la Luna Elipso 92
85. "Doloro nur pro la okuloj" 93
86. Protekti Orelringojn 94
87. Dividi la Ŝtelaĵon 95
88. Simio kaj Sojfaboj 96
89. Ora Putoro 97
90. Malriĉulo kaj la Trovita Mono 98
91. Revo de malriĉulo 99
92. Knabo kaj Knelo 100
93. Maljunulino kaj Urso 101
94. kanalo "Mani" 102
95. Rakonto pri Gekolomboj 103
96. Falsa Blindulo 104
97. Perdo de Ambaŭ Vesto kaj Ormonero 105
98. Mortigi Testudon 106

# Fabloj de Cent paraboloj


## 1. Manĝado de Salo

Iam antaŭe, malsaĝulo gastis ĉe sia amiko. La amiko regalis lin per manĝaĵo. Li sentis la manĝaĵon sengusta, do la amiko aldonis iom da salo. Li gustumis la manĝaĵon kaj trovis ĝin multe pli bongusta. Li pensis: "La manĝaĵo bongustas pro la salo. Nur iom da salo faris la manĝaĵon tiel bongusta, do pli da salo faros ĝin multe pli bongusta." Li do ekmanĝis nur salon. Tio difektis lian gustorganon kaj suferigis lin treege.




## 2. Lakto por Festeno

Iam malsaĝulo volis regali gastojn kaj ekpreparis bovinan lakton por la festeno. Li pensis: "Se mi melkos la bovinon ĉiutage, la lakto pli kaj pli multiĝos, sed mankos al mi la tenujoj por tio. Krome, la lakto facile granciĝos. Estas pli bone, ke la bovino tenu la lakton en sia ventro ĝis la festeno." Do li apartigis la bovidon for de la bovino. Monaton poste, li elkondukis la bovinon je la festeno. Sed tamen, malgraŭ lia pena melkado, la bovino donis neniom da lakto. La gastoj aŭ mokridis lin aŭ koleris je li pro tio.




## 3. Vundiĝo pro Piroj

Iam estis kalva malsaĝulo. Iu senĉese batis la kapon al li per piroj kaj vundis lin, tamen li toleris la baton silente anstataŭ forkuri. Vidinte tion, oni admonis lin: "Kial vi ne forkuru? Jen via kapo vundiĝis pro la bato." Sed la malsaĝulo respondis: "La batanto estas forta kaj sovaĝa, sed tre malsaĝa. Li prenis mian senharan kapon kiel ŝtonon, batis per piroj kaj vundis ĝin." Oni diris: "Kiel malsaĝa vi estas, kaj vi eĉ opinias lin tia! Se vi havus sufiĉan prudenton, vi forkurus kaj facile evitus tion. Kial vi lasas lin daŭre vundadi al vi la kapon!"




## 4. Malĉastulino kaj Ŝia Edzo

Iam estis malsaĝulo, kiu amegis sian edzinon. Lia edzino estis ĉarma, sed malĉasta. Dum ŝia kontakto kun aliaj viroj, ŝin regis arda pasio. Ŝi volis forlasi sian propran edzon kaj sin ĵeti en la sinon de alia viro. Ŝi do ŝtele diris al maljunulino: "Post mia foriro vi trovu virinan kadavron, metu ĝin en nian ĉambron, kaj diru al mia edzo, ke mi mortis." Dum foresto de la malsaĝulo, la maljunulino metis virinan kadavron en lian ĉambron, kaj poste diris al li: "Via edzino mortis." Rigardinte la kadavron, la edzo vere kredis tion. Li do ploregis korŝire. Per multaj lignoj kaj oleo li cindrigis la kadavron, ensakigis la cindron kaj tenis ĝin en sia sino tagnokte. Nelonge poste, la edzino tediĝis pri la kromedzo, kaj revenis al sia antaŭa hejmo. Ŝi diris al la edzo: "Mi estas via edzino." La edzo respondis: "Mia kara edzino jam forpasis. Kiu estas vi, ke vi eĉ aŭdacas pretendi vin kiel mian karulinon!" Malgraŭ la eksplikado de la edzino, la malsaĝulo neniel kredis, ke ŝi vere estas lia edzino.



## 5. Trinki Akvon el la Rivero

Iam estis viro, al kiu mankas saĝo. Foje, li suferis pro soifo kaj volegis trinki akvon. Kiam li vidis vaporon el la kamparo, li opiniis, ke tio estas akvo. Do li kuregis longan vojon eĉ ĝis Hindia Rivero. Atinginte la riverbordon, li nur gapis la akvon anstataŭ ektrinki. Iu demandis: "Vi serĉis akvon por trinki. Nun vi ja estas ĉe la rivero; pro kio vi ne trinkas?" La malsaĝulo respondis: "Mi trinkus, se mi povus fintrinki ĉion el la rivero; tamen estas tro multe da akvo por mi trinki, mi do trinku neniom." Aŭdinte tion, ĉiuj ekridis.




## 6. Malsaĝulo kaj Lia Mortinta Filo

Iam antaŭe, malsaĝulo havis sep filojn. Post morto de unu el la filoj, la patro intencis transloĝiĝi por restigi la mortinton en la domo. Informiĝinte pri lia decido, la najbaroj diris al li: "La vivantoj kaj mortintoj apartenas al malsamaj mondoj. Vi devas bele vesti lin kaj enterigi lin en malproksimo. Pro kio vi mem pretas transloĝiĝi por cedi al li la domon?" Aŭdinte tion, la malsaĝulo pensis: "Se mi ne restigos la mortinton en la hejmo, mi devos porti lian korpon eksteren por enterigi. Mi do mortigu alian por ligi al la alia pinto de mia vekto. Tio faciligos al mi la portadon." Li do mortigis alian filon, vekte portis ambaŭ kadavrojn eksteren kaj enterigis en malproksima arbaro. Oni ĉiuj mokis lin. Ili opiniis, ke ili neniam vidis tiel stultan homon en la mondo.



## 7. Fratiĝo nur por Mono

Iam estis viro bela, saĝa kaj riĉa. Ĉiuj en la regiono laŭdis lin. Vidinte tion, malsaĝulo titolis lin frato por peti lian monon laŭ bezono. Sed kiam la riĉulo povriĝis, kaj devis pagi siajn ŝuldojn al aliaj, la malsaĝulo ne plu tiel nomis lin. La najbaroj riproĉis la malsaĝulon: "Vi estas stulta. Kial vi nomis lin frato kiam vi bezonis monon, sed tuj deklaris lin ne via frato kiam li ŝuldis al aliaj?" La malsaĝulo respondis: "Mi nomis lin frato nur por peti lian monon. Fakte li ne estas mia frato. Do kiam li povriĝis, mi ne plu rigardu lin kiel mian fraton." Aŭdinte tion, oni ĉiuj mokridis lin.



## 8. Ŝtelisto kaj la priŝtelaĵo

Antaŭ longa tempo, iu ŝtelis vestaĵojn el la reĝa trezorejo kaj forkuris malproksimen. La reĝo sendis armeon kapti lin. Kiam oni eskortis lin al la reĝo, la reĝo demandis: "De kie vi havigis al vi la vestaĵojn?" La ŝtelisto respondis: "Tio estas la heredaĵo de mia avo." La reĝo ordonis lin surmeti la vestaĵojn. La vestaĵoj fakte ne apartenis al la ŝtelisto, do li tute ne sciis kiel konvene sin vesti per ili. Tion, kion oni devas meti sur la manojn, li metis sur la piedojn; tion, kion oni devas meti sur la talion, li metis sur la kapon. La reĝo alvenigis ĉiujn siajn subulojn, kaj detale informis ilin pri la okazaĵo. Li diris al la ŝtelisto: "Se la vestaĵoj estus hereditaj de via avo, vi devus scii kiel surmeti ilin konvene. Sed pro kio vi ne povas vin vesti ĝuste? Tiel oni scias bone, ke la vestaĵoj estas ŝtelaĵoj, sed ne viaj propraj posedaĵoj."



## 9. Laŭdo al la Patro


Iam, iu laŭdis sian patron al aliuloj, dirante: "Mia patro estas bonkora. Li nek atencas nek ŝtelas; li estas honesta kaj justa; li estas malavara kaj emas doni almozon." Aŭdinte tion, malsaĝulo diris: "La virto de mia patro estas des pli supera." La aliaj demandis: "Kia estas via patro? Bonvolu diri al ni." La malsaĝulo respondis: "Li eĉ neniam spertis seksan vivon ekde la infaneco." La aliaj demandis: "Se li estus libera de volupto, kiel li povus generi vin?" Tio fariĝis onia ridindaĵo.



## 10. Konstruigi Trietaĝan Domon


Antaŭ longa tempo estis riĉa homo senscia kaj malsaĝa. Kiam li gastis ĉe alia riĉulo, li vidis trietaĝan domon altan, vastan kaj brilan. Li ekŝatis ĝin kaj diris al si mem: "Mi estas ne malpli riĉa ol li. Kial mi ne konstruigu tian etaĝdomon?" Li do senprokraste alvenigis metiistojn kaj demandis ilin: "Ĉu vi povas konstrui tian etaĝdomon?" Ili respondis: "Jes, ni povas. Tiu etaĝdomo estas konstruita de ni mem." Li ordonis: "Konstruu por mi tian etaĝdomon." La metiistoj konsentis kaj eklaboris. Ili mezuris la sidejon kaj ekmasonis brikojn por la konstruaĵo.

Vidinte tion, la riĉa homo neniel komprenis, kion faras la metiistoj. Li demandis ilin: "Kian domon vi konstruas?" Ili respondis: "La trietaĝan." La riĉulo diris: "Mi ne volas la malsuprajn du etaĝojn. Konstruu por mi nur la plej supran." Ili respondis: "Tio ne eblas. Kiel oni povas konstrui la duan etaĝon sen la unua, kaj la trian etaĝon sen la dua?" La malsaĝulo ordonis obstine: "Mi ne volas la malsuprajn etaĝojn. Vi devas konstrui nur la supran por mi!" Aŭdinte la respondon, ĉiuj metiistoj mokis lin kun rido:"Kiu en la mondo kapablas konstrui la suprajn etaĝojn sen la malsupraj!"




## 11. Antaŭvido de la Bramanano

Iam estis bramano. Li pretendis, ke li estas erudicia pri astrologio kaj aliaj diversaj scioj. Li volis pavi per sia kapablo, do li iris al alia lando, brakumis sian filon en la sino, kaj ploregis dolore. Vidinte tion, oni demandis: "Pro kio vi ploras?" La bramano respondis: "Tiu ĉi knabeto mortos en sep tagoj. Min doloras la mallongeco de lia vivo, do mi ploras." Oni konsolis lin: "La homa vivo estas ne facile sondebla. Eble vi eraris en la kalkulo, kaj li ne mortos je la supozita tempo. Kial vi ploras antaŭe pro tio?" La bramano respondis: "Eĉ mallumiĝus la suno kaj la luno, kaj eĉ falus la steloj, tamen neniam eraras mia aŭguro." Sorĉate de la prestiĝo kaj profito, li mortigis sian propran filon je la sepa tago por pravigi la aŭguron. Informiĝinte pri la morto de la knabo, oni admiris lian kapablon: "Vere ĉioscia homo! Li pravas en la aŭguro." Ili ekkredis kaj estimis lin.




## 12. Malvarmigi Bolantan Akvon

Iam antaŭe, kiam malsaĝulo dekoktis nigran sukeron por solidigi ĝin, riĉulo venis en lian domon. La malsaĝulo pensis: "Mi devas regali lin per sukera akvo." Li tuj verŝis iom da akvo en la kaldronon kaj ekboligis ĝin. Dum la boligado li senĉese ventumis la akvon per ventumilo, por ke ĝi malvarmiĝu kiel eble plej rapide. Vidinte tion, oni diris al li: "Kiel la sukera akvo povas malvarmiĝi je via ventumado, se vi ne ĉesigas la bruladon de la fajro?"




## 13. Koleremulo

Iam antaŭe, dum babilado kun aliaj en la ĉambro, iu laŭdis, ke iu alia estas bonulo krom nur du mankoj: koleremo kaj senpripensemo. Ĝuste tiam, la priparolato pasis preter la domo kaj hazarde kaptis la lastajn vortojn. Li do enĉambriĝis furioze, kaptis la parolinton kaj ekbatis lin. La ĉeestantoj demandis: "Pro kio vi batas lin?" La koleremulo respondis: "Kiam mi estis kolerema kaj senpripensema? Tamen li tiel diraĉis, mi do lin batis." Oni diris: "Jen vi ja montras viajn koleremon kaj senpripensemon. Kial vi ankoraŭ neas pri tio?" La koleremulo furioziĝis kiam oni parolis pri liaj mankoj, kaj oni ĉiuj mokis lin pro tio.




## 14. Komercistoj kaj ilia Gvidisto

Iam antaŭe, pluraj komercistoj volis vojaĝi al la maro, tamen neniu el ili konis la vojon. Ili decidis dungi gvidiston por gvidi ilin. Post serĉado, ili fine trovis unu kaj ekvojaĝis sub lia konduko. Ili renkontis templon de Dio en sovaĝa regiono. Tie oni devis mortigi homon kaj oferi lin al la Dio por preterpasi la templon. La komercistoj interkonsiliĝis, kaj diris: "Ni ĉiuj estas amikoj aŭ parencoj, do neniu el ni devus esti mortigita. Nur la gvidisto taŭgas por tio." Ili do mortigis la gvidiston, oferis lin al la Dio, kaj daŭrigis sian vojaĝon. Sed tamen ili perdis la vojon post nelonge. Neniu sciis, al kiu direkto ili devas iri. Pro tio ili ĉiuj mortis de malsato en la sovaĝejo.



## 15. Medicinaĵo Rapide Kreskiga

Iam al reĝo naskiĝis filineto. La reĝo tuj alvenigis palacan kuraciston kaj ordonis lin: "Donu al mi bonan medicinaĵon, por ke mia filino elkreskiĝu senprokraste per ĝi." La kuracisto respondis: "Mi donos al vi bonan medicinaĵon, kiu povas elkreskigi ŝin rapide, sed nun mi devas iri aliloken por pretigi ĝin. Vi ne rajtas vidi vian filinon ĝis mia reveno. Post kiam mi estos preta, mi petu ŝin preni la medicinaĵon kaj montru ŝin al vi." La kuracisto do vojaĝis malproksimen por la medicinaĵo. Post dek du jaroj li revenis al la palaco. Tuj kiam la reĝidino prenis la medicinaĵon, li kondukis ŝin al la reĝo. Vidinte, ke lia filino estas multe pli alta ol antaŭe, la reĝo ĝojegis. Li pensis: "Vere bona kuracisto! Mia filino prenis lian medicinaĵon, kaj vere kreskis tiel multe." Li do premiis la kuraciston per multaj trezoroj. Tiam ĉiuj miris pri la malsaĝo de la reĝo. Li eĉ ne scipovis kalkuli la tempon, sed atribuis la kreskadon de la filino nur al medicinaĵo!



## 16. Plidolĉigi Sukerkanon

Iam antaŭe, du viroj kune plantis sukerkanon. Ili interkonsentis, ke ili premiu tiun, kiu plantas bone, kaj punu tiun, kiu plantas malbone. Tiam iu el ili pensis: "La sukerkano estas tre dolĉa. Se mi elpremos la sukon, kaj per ĝi akvumos la plantaĵon, multe pli dolĉiĝos mia sukerkano ol la lia." Li do elpremis la sukon de sukerkano, kaj per ĝi akvumis la plantaĵon. Sed la plantaĵo velkiĝis, kaj li ĉion perdis pro tio.



## 17. Kvarcent Moneroj por la Kvindek

Iam estis komercisto. Oni ŝuldis al li kvindek monerojn, kaj ne redonis la monon por longa tempo. Li do iris al la ŝuldanto por postuli la monon. Li renkontis riveron sur la vojo, kaj elspezis ducent monerojn por ĝin transpasi boate. Atinginte la cellokon, li ne sukcesis trovi la ŝuldanton, kaj povis fari nenion alian ol reveni hejmen. Li denove elspezis ducent monerojn pro la rivero dum sia reveno. Krome, li suferis ankaŭ de lacego pro la longa vojaĝo. Li perdis tro multe por malmulte da ŝuldo. Oni ĉiuj mokis lin pri tio.




## 18. Proksimiĝo al la Akrilo

Iam antaŭe, malriĉulo vivis en granda mizero. Li laboregis por la reĝo dum longa tempo, kaj malgrasiĝis tagon post tago de la peza laboro. Vidinte tion, la reĝo kompatis lin, kaj donacis al li mortan kamelon. La malriĉulo akceptis la donacon, kaj senprokraste eksenfeligis ĝin. Lia tranĉilo malakriĝis dum la laboro, li do ekserĉis akrigilon. Finfine li trovis la akrigilon en la supra etaĝo, kaj tie akrigis la tranĉilon. Poste, li revenis malsupren por la senfeligado. Tiel li supreniradis multfoje por akrigi la tranĉilon, kaj tediĝis de tio iom post iom. Por eviti pluan supreniradon, li ŝnure tiris la kamelon sur la supran etaĝon por ĝin proksimigi al la malgranda akrigilo. Pro tio li estis mokita de aliaj.



## 19. Serĉadi la Perditan Bovlon

Iam antaŭe, dum iu veturis sur la maro, li senatente faligis sian arĝentan bovlon en akvon. Li pensis: "Mi faru signon sur la akvon kaj forlasu la bovlon tie. Poste mi revenu por ĝin retrovi." Post du monatoj li venis en la regionon de Sri-Lankao kaj aliaj regnoj. Kiam li vidis riveron, li tuj enakviĝis por serĉi la perditan bovlon. Oni demandis: "Kion vi faras?" Li respondis: "Mi perdis arĝentan bovlon, kaj volas ĝin retrovi." Oni demandis: "Kie vi ĝin perdis?" Li respondis: "En la loko de kie mi ĵus ekveturis." Oni demandis: "Kiam vi ĝin perdis?" Li respondis: "Antaŭ du monatoj." Oni diris: "Antaŭ du monatoj! Kiel vi povos retrovi ĝin ĉi tie!" Li respondis: "Kiam mi faligis la bovlon, mi faris signon sur la akvon. Ĉi tie la akvo estas sama kiel tiu, kiun mi signis, do mi serĉas ĝin ĉi tie." Oni diris: "Kvankam la akvo estas sama, tamen vi perdis la bovlon en alia loko. Nun vi serĉas ĝin ĉi tie. Kiel vi povos ĝin retrovi?" Do ili ĉiuj priridis lin.



## 20. La Reĝo kaj la Mispunito

Iam antaŭe, iu parolis pri la mankoj de la reĝo, kaj diris: "La reĝo estas despota kaj senkompetenta. Li tute ne scipovas regi la landon racie kaj konvene." Informiĝinte pri tio, la reĝo ege furioziĝis. Anstataŭ detale pridemandi, kiu vere estas la parolinto, li nur kredis al insidemulo kaj kaptis virtulon kiel krimulon. Li detranĉigis cent taelojn da karno el la korpo de la kaptito kiel puno. Poste, iu atestis, ke la virtulo fakte diris nenion pri la reĝo. La reĝo ekpentis, kaj pretigis mil taelojn da viando por replenigi la vundon de la mispunito. La mispunito suferis de granda doloro kaj li ĝemadis senĉese tagnokte. Aŭdinte tion, la reĝo demandis: "Kial vi ankoraŭ turmentiĝas? Mi detranĉis cent taelojn da karno el via korpo, sed dekoble kompensis vian perdon. Ĉu vi ankoraŭ ne kontentas pri tio? Pro kio vi ankoraŭ ĝemadas?" Iu apudestanto respondis: "Se Via Moŝto detranĉus mian kapon, mi ne povus eviti morton eĉ se vi redonus al mi mil kapojn. Kvankam vi kompensis lin dekoble pro la detranĉita karno, li ne povas sin deteni de la dolorego."



## 21. Deziro por Pliaj Filoj

Iam antaŭe estis virino. Ŝi jam havis filon, tamen ankoraŭ deziris pliajn. Ŝi do demandis aliajn virinojn: "Kiu havas metodon por ke mi nasku pliajn filojn?" Maljunulino respondis: "Mi havas metodon, tamen por tio vi devas fari oferon al Dio." La virino demandis: "Kion mi oferu?" La maljunulino respondis: "Mortigu vian filon, kaj oferu lian sangon. Tio ebligos al vi naski multajn filojn." La virino vere obeis ŝin kaj decidis mortigi sian filon. Saĝulino riproĉis ŝin kun rido: "Kiel malsaĝa kaj senscia vi estas! Estas ankoraŭ ne certe, ĉu vi vere povos naski la deziratajn filojn, tamen vi eĉ mortigos vian unuenuran!"



## 22. Elvendi Kalambakon

Iam antaŭe, iu el nobela familio serĉis kalambakon en la maro. Li kolektis nur ĉaron da kalambako dum pli ol unu jaro, kaj portis tion hejmen. Kiam li portis la kalambakon al la bazaro por vendi, neniu aĉetis pro la alta valoro. Do li elvendis neniom dum multaj tagoj. Tediĝinte pri tio, li dronis en granda malĝojo. Tiam li vidis, ke lignokarbo estas bone vendebla, li do pensis: "Se mi bruligos kalambakon en lignokarbon, eble tio vendiĝos multe pli rapide." Do li karbigis kaj elvendis la kalambakon en la bazaro, sed li enspezis malpli ol tiom de duonĉaro da lignokarbo.



## 23. Ŝtelisto kaj la Ŝtelitaj Silkaĵoj

Iam ŝtelisto priŝtelis delikatajn kaj valorajn silkaĵojn de riĉulo, kaj per la ŝtelitaj silkaĵoj pakis siajn malnovajn teksaĵojn kaj aliajn objektojn. Saĝaj homoj mokis lin pri tio.




## 24. Semi Rostitan Sezamon

Iam antaŭe, malsaĝulo manĝis la sezamon neprilaboritan, kaj opiniis tion ne bongusta. Rostinte la sezamon, li gustumis kaj trovis ĝin multe pli bongusta. Li do pensis: "Ĉu la sezamo ne estus pli bongusta, se mi rostu ĝin antaŭ la semado?" Li do rostis kaj semis la sezamon en la kampon. Sed tamen, la rostita sezamo neniam elkreskis.



## 25. Akvo kaj Fajro

Iam antaŭe iu estis bezononta fajron kaj malvarman akvon por ion fari. Li do metis pelvon da akvo super fajro kaj lasis la fajron bruladi dum la nokto. Poste, kiam li volis fajron, la fajro jam estingiĝis, kaj kiam li volis malvarman akvon, la malvarma akvo jam varmiĝis. Li do perdis ambaŭ fajron kaj malvarman akvon.




## 26. Gajni Favoron de la Reĝo

Iam antaŭe, iu volis gajni favoron de la reĝo, kaj demandis la aliulojn: "Kiamaniere mi povas gajni favoron de la reĝo?" Oni respondis: "Se vi volas gajni favoron de la reĝo, vi devas imiti liajn konduton kaj aspekton."

Li do iris al la reĝo. Kiam li vidis, ke la reĝo palpebrumadis, li ankaŭ imite palpebrumadis. La reĝo demandis al li: "Pro kio vi palpebrumadis? Ĉu vi suferas de malvarmumo aŭ okuldoloro?"

La viro respondis: "Mi suferas nek de malvarmumo nek de okuldoloro. Nur por gajni vian favoron mi tion faris imite." Aŭdinte lian respondon, la reĝo koleriĝis, ordonis puni lin kaj forpeli lin el la regno.



## 27. Metodo por Kuraci Vundon

Iam antaŭe, iu estis skurĝita de la reĝo. Post tio, li ŝmiris sian vundon per ĉevala fekaĵo kun espero, ke la vundo cikatriĝu pli rapide. Tiam malsaĝulo vidis tion kaj ekĝojis, pensante: "Mi trovis bonan metodon por kuraci vundon." Li do hastis hejmen, kaj ordonis al sia filo: "Skurĝu min je la dorso. Mi havas bonan metodon por kuraci vundon kaj volas ĝin provi." Skurĝite, li ŝmiris sian vundon per ĉevala fekaĵo, kaj prenis tion kiel bonan kuracarton.



## 28. Pliĉarmigi la Edzinon

Iam antaŭe vivis malsaĝulo. Lia edzino estis ĉarma krom la malbela nazo. La malsaĝulo eliris, kaj hazarde vidis virinon ĉarman kun bela nazo. Li pensis: "Mi detranĉu ŝian nazon, kaj metu ĝin sur la vizaĝon de mia edzino. Ĉu mia edzino ne pli ĉarmiĝus je tio?" Li do detranĉis la nazon de la virino, kaj haste revenis hejmen kun la detranĉita nazo. Li senprokraste elvenigis sian edzinon: "Eliru rapide! Mi donu al vi belan nazon." Je la eliro de la edzino, li tuj detranĉis ŝian nazon, kaj metis la alian sur ŝian vizaĝon. Sed bedaŭrinde, la nazo neniel povis algluiĝi al la vizaĝo. Do li vane sennazigis kaj dolorigis ankaŭ sian edzinon.



## 29. Klopodo por Plej Valora Vestaĵo

Iam antaŭe, malriĉulo vivis en mizero, kaj tenis sian vivon nur per laborado por la aliaj. Oni donis al li malnovan vestaĵon, kaj per ĝi li sin vestis. Kiam iu vidis tion, li diris al la malriĉulo: "Vi ja naskiĝis el nobela klaso kaj prestiĝa familio. Kiel vi povas surporti tiel malnovan vestaĵon? Mi instruu al vi, kiel vi havigu al vi la plej valoran. Vi devas agi laŭ mia instruo. Mi ne trompas vin." La malriĉulo ekĝojis, kaj promesis lin obei. La viro do bruligis fajron antaŭ ili, kaj ordonis: "Demetu vian vestaĵon, kaj ĵetu ĝin en la fajron. Vi trovos el cindro la plej valoran vestaĵon, donacitan de la reĝo." La malriĉulo vere tiel agis laŭ la propono. Poste li serĉadis la deziratan vestaĵon en la cindro, sed trovis nenion.



## 30. Edziĝo de la Paŝtisto

Iam antaŭ longa tempo vivis ŝafisto. Li lertis en la paŝtado, kaj liaj ŝafoj plimultiĝis ĝis miloj. Tamen li estis tre avara, kaj neniam volis helpi al la aliaj. Tiam insidemulo intencis lin trompi per artifiko. Li do iris kun sia parenco al la ŝafisto, kaj diris al li: "Nun mi volas parenciĝi kun vi kiel en unu familio. Mi scias, ke tiu ĉi viro havas ĉarman filinon. Mi svatu ŝin al vi kiel vian edzinon." Aŭdinte tion, la ŝafisto tre ĝojis. Li donacis al tiu multajn ŝafojn kaj alian havaĵon.

Post nelonge, la insidemulo revenis al la ŝafisto, kaj diris: "Hodiaŭ via edzino naskis filon al vi." La ŝafisto ankoraŭ ne vidis sian edzinon, tamen li ekzaltiĝis de la informo. Li denove donacis multe al la insidemulo.

Poste, la insidemulo refoje revenis al la ŝafisto, kaj informis lin: "Via filo mortis post sia naskiĝo." Informiĝinte pri tio, la ŝafisto ekploregis dolore.



## 31. “Kapabla Azeno”

Iam bramano volis okazigi religian ceremonion. Li ordonis sian lernanton: "Mi bezonas bakitajn urnojn por la ceremonio. Iru al la bazaro kaj dungu metiiston por mi." La lernanto obeis, kaj iris al la hejmo de metiisto.

Tiam la metiisto portis per azeno bakitajn urnojn al la bazaro por vendi, sed survoje la azeno rompis ĉion dum momento. Li povis fari nenion alian ol reveni hejmen deprimita, kaj ploris ĉagrene pro la perdo. Vidinte lin, la lernanto demandis: "Pro kio vi tiel ĉagreniĝis?" La metiisto respondis: "Por min vivteni, mi laboregis pene dum longa jaro, kaj elfaris multajn bakitaĵojn, tamen kiam mi portis ilin al la bazaro por vendi, la damninda azeno rompis ĉion dum momento. Ĝuste pro tio mi ĉagreniĝis."

Aŭdinte la respondon, la lernanto diris kun ĝojo: "Tiu azeno estas vere eksterordinara! Ĝi eĉ kapablas momente detrui ĉion, kion vi elfaris dum tiel longa tempo. Nun mi volas ĝin aĉeti." La metiisto ekĝojis, kaj tuj vendis la azenon al li.

Kiam la lernanto revenis kun la azeno, la bramano demandis: "Pro kio vi alvenigis azenon anstataŭ la metiiston?" La lernanto respondis: "Tiu ĉi azeno estas multe pli kapabla ol la metiisto por bakitaĵoj. Ĝi povas detrui ĉiujn urnojn, kiujn elfaris la metiisto dum longa tempo." Informiĝinte pri tio, la bramano riproĉis lin: "Kiel senscia kaj malsaĝa vi estas! Tiu ĉi azeno povis hazarde detrui la bakitaĵojn, tamen ĝi ne scipovas elfari tion eĉ dum cent jaroj."



## 32. Ŝtelita Oran Ingoton

Iam antaŭe, du komercistoj faris sian propran negocon en la sama loko. Unu el ili vendis oron, dum la alia vendis kotonon. Klientoj kutime ardigis la orajn ingotojn de la orvendisto por taksi ilian verecon. La vendisto de kotono hazarde ŝtelis ĵus ardigitan ingoton, kaj kaŝis ĝin en kotonon. La kotono forbruliĝis pro la ardo de la oro. La priŝtelo estis malkaŝita, kaj anstataŭ havigi al si la oran ingoton, la ŝtelisto perdis ankaŭ sian kotonon.



## 33. Haki Arbon por Preni Fruktojn

Iam, reĝo havis altan kaj dikan pomarbon, kiu abunde donas fruktojn dolĉajn kaj bongustajn. Foje kiam venis gasto, la reĝo demandis lin: "Tiu ĉi arbo donas bongustajn fruktojn. Ĉu vi volas manĝi?" La gasto respondis: "Tiu ĉi arbo estas dika kaj alta. Kiel mi povas preni la fruktojn eĉ se mi volas manĝi?" La reĝo do ordonis dehaki la arbon por preni la fruktojn pli facile estonte. Sed tamen, la arbo ne plu donis fruktojn. Poste, kiam oni denove provis restarigi la arbon, ĝi jam sekiĝis kaj neniam reviviĝis plue.



## 34. Mallongigi la Vojon


Iam antaŭe, iu vilaĝo distancis al la ĉefurbo je kvin joŝanoj*. En la vilaĝo troviĝis dolĉa fonto. La reĝo ordonis la vilaĝanojn porti dolĉan akvon ĉiutage al li. Lacigite de tio, ĉiuj vilaĝanoj volis fuĝi aliloken por sin teni malproksima de la vilaĝo. Tiam la vilaĝestro diris al ili: "Ne foriru. Mi petu la reĝon ŝanĝi la distancon de kvin joŝanoj al tri por mallongigi la vojon kaj senlacigi vin ĉiujn." Poste, li iris al la reĝo por peti la favoron. La reĝo konsentis, kaj vere ŝanĝis la kvin joŝanojn al tri. Informiĝinte pri tio, la vilaĝanoj ĝojegis. Iu alia diris al ili: "La vojo longas ankoraŭ kvin joŝanojn, kaj neniom malplilongiĝis." Sed neniu el la vilaĝanoj volis forfuĝi plue pro kredo al la reĝo, malgraŭ la vero.

**joŝanoj: hinda longunuo, dudek, dudek kvin aŭ tridek kilometroj, laŭ diversaj onidiroj.*



## 35. La Hazardaj Trezoroj

Iam estis malriĉulo, kiu vivis en granda mizero. Li ŝuldis tre multe al aliaj, kaj havis neniom por redoni la ŝuldon. Li do povis fari nenion alian ol fuĝi malproksimen. Kiam li venis en dezerton, li hazarde trovis skatolon plenan de trezoroj. Sub ĝia kovrilo kuŝis spegulo sur la valoraĵoj. Vidinte la skatolon, li ĝojegis, kaj tuj malfermis la kovrilon. Sed kiam li vidis homfiguron en la spegulo, li ektimis. Alpremante la manojn surbruste, li diris humile: "Mi opiniis, ke ĝi estas malplena skatolo. Mi tute ne atendis, ke vi estas ene. Indulgu min pro tio."



## 36. Restigi la Feon


Iam antaŭe iu sin kulturis en la montaro, kaj fine fariĝis feo kun kvin magiaj povoj. Per la magie travideblaj okuloj li povis vidi ĉiajn trezorojn kaj valoraĵojn kaŝitajn sub la tero. Kiam la reĝo informiĝis pri tio, li ĝojegis, kaj demandis al siaj subuloj: "Kion mi faru, ke li ĉiam restadu en nia regno anstataŭ iri al alia loko? Tio povus havigi al mi pli multe da trezoroj."

Malsaĝa subulo tuj iris al la feo, elprenis liajn okulojn kaj portis ilin al la reĝo. Li raportis: "Mi jam elprenis liajn okulojn, do li neniel povos iri al aliaj lokoj, sed porĉiam restos en nia regno." La reĝo riproĉis lin: "Mi volas restigi la feon en nia regno nur pro tio, ke li povas vidi ĉiajn trezorojn sub la tero. Nun vi jam difektis lian vidpovon, do per kio li estos ankoraŭ utila al mi?"



## 37. Mortigi la Restajn Bovojn

Iam antaŭe, paŝtisto havis ducent kvindek bovojn. Li paŝtis ilin en diversaj herbejoj laŭ sezono, kaj ĉiam prizorgis ilin atenteme. Foje, tigro formanĝis unu el ili, do la paŝtisto pensis: "Mi jam perdis unu bovon, kaj ne plu sufiĉas la antaŭa nombro. Por kio mi ankoraŭ paŝtu ilin?" Li do pelis la bovojn al alta krutaĵo, kaj puŝis ilin suben en profundaĵon. Ĉiuj liaj bovoj mortis de tio.




## 38. Trinki Akvon el la Ligna Tubo

Iam antaŭe, malsaĝulo soifegis dum sia promenado. Kiam li vidis klaran akvon elfluantan el ligna tubo, li tuj ektrinkis. Trinkinte ĝiskontente, li levis la manojn kaj diris: "Mi jam trinkis sufiĉe. Ĉesigu vian fluadon." Sed la akvo daŭre fluis kiel antaŭe. Li do koleris, kaj kriis: "Mi jam fintrinkis, kaj ordonis vin ĉesigi vian fluadon. Sed kial vi ankoraŭ fluaĉas?" Vidinte tion, oni diris al la trinkinto: "Kiel malsaĝa kaj senscia vi estas! Kial vi ne foriru, sed volas ĉesigi la fluadon de la akvo?" Dirinte, li tiris la trinkinton al alia loko.



## 39. Ŝmiri la Domon

Iam antaŭe, iu vizitis aliulon kaj vidis, ke liaj muroj estas bone ŝmiritaj, kaj la planko estas ankaŭ glata kaj pura. Li do demandis: "Per kio vi ŝmiris viajn murojn kaj plankon tiel okulplaĉaj?" La gastiganto respondis: "Unue, mi infuzis la rizbranon ĝisplene, kaj miksis ĝin en la ŝlimon. Poste mi ŝmiris la murojn per la ŝlimo. Do ili estas tiel okulplaĉaj." La vizitanto pensis: "Nur uzi la rizbranon estas malpli bone ol la rizgrajnon por pliglatigi kaj pliblankigi la murojn." Li do miksis rizgrajnon en la ŝlimon, kaj ŝmiris la muron. Sed tamen, la muroj des pli malglatiĝis kaj eĉ fendiĝis pro tio. Li do foruzis la rizgrajnon vane, kaj ankaŭ ne ricevis la deziratan efikon. Estus multe pli bone, se li donus rizgrajnon al malriĉuloj por havigi al si meriton.



## 40. Sufero de la Kalveco

Iam, estis homo kalva. Li suferis ne nur de malvarmo vintre kaj varmo somere, sed ankaŭ de la pikado de moskitoj kaj tabanoj. Pro tio li turmentiĝis tagnokte, kaj suferis multe.


Alvenis kuracisto lerta pri diversaj kuracartoj. La kalvulo do vizitis lin, kaj diris al li: "Mi petas, ke vi kuracu min de la kalveco." La kuracisto estis ankaŭ kalva, li do demetis sian ĉapon kaj respondis: "Ankaŭ mi suferas dolore de la kalveco. Se mi povus kuraci tion, mi nepre kuracus al mi unue por forigi la suferon."



## 41. Kverelo inter Du Demonoj

Iam antaŭe, du demonoj komune posedis skatolon, bastonon kaj paron da sandaloj. Ili konfliktis unu kun la alia por proprigi al si ĉion el ili. Do ili senĉese kvereladis tagnokte.

Tiam iu vidis tion, kaj demandis: "Je kio raras la skatolo, bastono kaj sandaloj, ke vi eĉ kvereladis tiel furioze?" La demonoj respondis: "La skatolo povas eligi vestaĵojn, manĝaĵojn, matracojn, litaĵojn kaj ĉiujn aliajn bezonaĵojn; per la bastono oni povas subigi ĉian malamikon, ke ili neniam kontraŭstaru plue; kaj per la sandaloj oni povas flugi libere en la ĉielo." Informiĝinte pri tio, la viro diris al la demonoj: "Tenu vin malproksimaj por momento, ke mi dividu ilin konvene por vi." Je lia ordono, la demonoj iris malproksimen. La viro do prenis la skatolon kaj bastonon, kaj per la sandaloj li flugis en la ĉielon. La demonoj ektimis, sed povis fari nenion kontraŭ tio. La viro do diris al ili: "Nun mi ja posedas tion, pri kio vi kvereladis senĉese. Ne kverelu plue."



## 42. Protekti la Kamelan Felon

Komercistoj vojaĝis por negoco, sed ĝuste sur la vojo unu el iliaj kameloj mortis. La kamelo iam portis multajn trezorojn, ornamaĵojn kaj valorajn teksaĵojn. Post la morto de la kamelo, oni tuj senfeligis ĝin. Je la foriro, la ĉefkomercisto restigis du el siaj lernantoj, kaj ordonis: "Bone gardu la kamelan felon, por ke ĝi ne putriĝu de malsekiĝo." Ekpluvegis post nelonge. La malsaĝaj lernantoj kovris la felon per valoraj teksaĵoj por protekti ĝin kontraŭ malsekiĝo sed damaĝis la teksaĵojn. La prezo de la teksaĵoj estis multe pli alta ol tiu de la felo. Pro sia malsaĝo ili protektis la malkaran felon per valoraj teksaĵoj.



## 43. Granda Ofero por Bagatelaĵo

Iu frotadis ŝtonegon pene dum longaj jaroj, kaj finfine faris el tio malgrandan bovan modelon kiel ludilon. Li oferis tro multe por la bagatelaĵo.



## 44. Satiĝo pro la Duona Kuko

Iam antaŭe, iu malsatiĝis, kaj elprenis sep kukojn por manĝi. Li satiĝis nur post kiam li manĝis ses kaj duonon. Li do ekpentis, kaj sin batis per ambaŭ manoj. Li sin riproĉis: "Mi satiĝis nur pro tiu ĉi duona kuko. Do la antaŭajn mi manĝis vane. Se mi scius, ke la duona kuko povus min satigi, mi ja devus ĝin manĝi unue."



## 45. Gardi Pordon

Iam antaŭe, iu volis vojaĝi malproksimen, kaj ĉe la forlaso li ordonis la serviston: "Bone gardu la pordon, azenon kaj ŝnuron." Post la forlaso de la mastro, vaganta muzikisto ludis muzikon en la najbara domo. La servisto volegis aŭskulti, kaj neniel povis sin deteni de la deziro. Li do ligis la pordon sur la azenon per la ŝnuro, kaj kondukis la azenon al la ludejo por muziko.

Post forlaso de la servisto, ŝtelisto priŝtelis la domon kaj forprenis trezoron. Kiam la mastro revenis, li demandis la serviston: "Kie estas la trezoro?" La servisto respondis: "Vi nur ordonis min gardi la pordon, azenon kaj ŝnuron. Mi scias nenion krom tio." La mastro do kulpigis lin: "Mi ordonis vin gardi la pordon nur por la trezoro. Nun la trezoro jam perdiĝis, do por kio mi ankoraŭ bezonas la pordon?"




## 46. Serĉi Gruntbovon

Iam antaŭe, vilaĝanoj kune ŝtelis gruntbovon kaj ĝin formanĝis. La perdinto sekvis ilin al la vilaĝo laŭ la piedsignoj. Post kiam li priskribis la aspekton de la bovo, li demandis vilaĝanon: "Ĉu la bovo estis en via vilaĝo?" La vilaĝano respondis: "La bovo ne estis en nia vilaĝo." Li demandis: "Ĉu troviĝas lageto en la vilaĝo kaj vi formanĝis la bovon ĉe la lageto?" La vilaĝano respondis: "Troviĝas neniu lageto en la vilaĝo." Li demandis: "Ĉu troviĝas arboj ĉe la lageto?" La vilaĝano respondis: "Troviĝas neniu arbo ĉe la lageto." Li demandis: "Ĉu vi ŝtelis la bovon en la oriento de la vilaĝo?" La vilaĝano respondis: "Ne troviĝas la oriento de la vilaĝo." Li demandis: "Ĉu vi ŝtelis la bovon je la tagmezo?" La vilaĝano respondis: "Ne troviĝas la tagmezo." La perdinto do diris: "Eĉ se vere troviĝus nek la lageto, nek la arboj, ĉu povus troviĝi nek la oriento, nek la tempo? De tio mi certas, ke vi mensogis nekredeble. Konfesu do, ĉu vi vere ŝtele formanĝis la bovon?" La vilaĝano do konfesis: "Jes, ni vere ĝin formanĝis."



## 47. Imiti Birdan Grakadon

Iam antaŭe, en iu regno ĉiuj virinoj sin ornamis per verdaj lotusfloroj dum la nacia festo. Tiam la edzino de malriĉulo diris al li: "Se vi trovos verdajn lotusflorojn por mi, mi daŭre estu via edzino, kaj se ne, mi eksedziniĝu de vi." Antaŭe, la malriĉulo lertis en imitado de birda grako. Do grakante kiel akvobirdo, li glitis en la reĝan lageton por ŝteli verdajn lotusflorojn. La gardisto de la lageto aŭdis sonon kaj demandis: "Kiu vi estas en la lageto?" La malriĉulo pretervole respondis: "Mi estas akvobirdo." La gardisto do kaptis lin por eskorti al la reĝo. Sur la vojo, la malriĉulo denove grakis imitante akvobirdon. La gardisto diris: "Al kio utilas via grakacho sur la tero?"



## 48. Besto kaj Arbo

Malgranda besto kuŝis sub la arbo. Subite arbobranĉo rompiĝis de vento kaj falis sur ĝian d orson. Ĝi do fermis la okulojn, kaj ne plu aŭdacis rigardi la arbon. Ĝi senprokraste forlasis la arbon, kaj kuris en senarban regionon. Jam mallumiĝis, sed mankis al ĝi kuraĝo reveni al la antaŭa kuŝejo. Kiam ĝi vidis, ke la arbobranĉoj svingiĝas je ventblovo en malproksimo, ĝi diris al si mem: "Ĝi vokas min." Ĝi do tuj revenis al la arbo.



## 49. Diskutado pri la Trovitaj Haroj

Iam antaŭe, du knaboj ludis en la rivero, kaj trovis tufon da haroj en la riverfundo. Unu diris: "Tio estas la barboj de feo." La alia diris: "Ne. Tio estas la haroj de bruna urso." Tiam ĉe la rivero loĝis feo. La infanoj disputadis senĉese, kaj finfine decidis viziti la feon por peti lian opinion. La feo senprokraste elprenis milion kaj sezamon, metis ilin en la buŝon kaj maĉis. Elkraĉinte la paston en la manon, li diris al la infanoj: "Tio, kio estas en mia mano, similas al la fekaĵo de pavoj." La feo respondis ne laŭ la demando, kaj baldaŭ ĉiuj informiĝis pri tio.



## 50. Kuraci la Ĝibon

Iam antaŭe, iu suferis de ĝibo, kaj petis kuraciston kuraci lin. La kuracisto ŝmiris oleon sur lian korpon, ligis lin inter du tabuloj per ŝnuro, kaj perforte premis la tabulojn. Tamen li tute ne atendis, ke la okuloj de la suferanto tuj eliĝis de tio.




## 51. Kuna Servistino

Kvin viroj kune aĉetis servistinon. Unu el ili ordonis ŝin: "Lavu por mi la vestaĵojn." Kaj ankaŭ ĉiu el la aliaj ordonis la samon al ŝi. La servistino respondis, ke ŝi faros tion laŭvice, kaj unue lavos por la unua. La dua viro koleris kaj kulpigis ŝin: "Mi aĉetis vin kun la aliaj, do kial vi lavos por li unue?" Li donis al la servistino 10 skurĝajn batojn. Ankaŭ ĉiu el la aliaj faris la samon.



## 52. Amuzisto kaj la Reĝo

Iam antaŭe, reĝo plezuriĝis de amuzisto, kaj promesis donaci al li mil monerojn. Poste, kiam la amuzisto postulis la monon, la reĝo ne plu volis plenumi sian promeson. La reĝo do diris al li: "Vi kutime plezurigas min senrekompence. Se mi donacus monon al vi, ankaŭ mi plezurigus vin."



## 53. Reciproka Venĝo

Iam instruisto havis du lernantojn. Li suferis de piedmalsano, li do ordonis ambaŭ lernantojn ĉiam ajn masaĝi aparte po unu el la piedoj. La lernantoj malamikiĝis kaj ĵaluzis unu kontraŭ la alia. Ĉe la foresto de unu, la alia per ŝtono rompis la piedon masaĝitan de li. Kiam li revenis, li koleris de tio, kaj ankaŭ rompis la piedon masaĝitan de la alia por sin venĝi.



## 54. Kapo kaj Vosto

Iam estis serpento. La vosto de la serpento diris al la kapo: "Mi devas rampi antaŭe." La kapo respondis: "Mi ĉiam rampas antaŭe. Pro kio vi subite volas anstataŭigi min?" Kiam la kapo rampis antaŭen, la vosto alkroĉiĝis al arbo kaj neniel moviĝis. La kapo povis fari nenion alian ol obei la voston kaj lasi ĝin rampi antaŭe. Sed pro tio, la serpento sin trudis en fajron kaj mortis de brulo.



## 55. Lojala Subulo


Iam antaŭe, reĝo havis lojalan subulon. Dum milito la subulo sinforgese savis la reĝon el danĝero. Pro tio la reĝo ĝojis, kaj volis donaci al li ĉion deziratan. Li do demandis la savinton: "Kion vi deziras? Mi donacu al vi ion ajn laŭ via deziro." Sed la subulo respondis: "Kiam vi bezonas razigi vian barbon, bonvolu lasi min razi por vi." La reĝo respondis: "Se tio plaĉas al vi, mi do kontentigu vian deziron."

Tiu malsaĝulo estis mokita de ĉiuj aliaj en la lando. La duonan teritorion kaj altrangon li povis akiri, sed li postulis nur la humilan profesion.



## 56. Postulado al "Nenio"

Iam du viroj promenis kune. Sur la vojo ili vidis, ke iu puŝis ĉaron da sezamo, kaj neniel kapablis movi la ĉaron el danĝero. Tiam, la ĉaristo petis: "Helpu min movi la ĉaron el la danĝero." La viroj demandis: "Per kio vi rekompencu nin?" La ĉaristo respondis: "Mi rekompencu vin per nenio." Apenaŭ la ĉaro atingis ebenan lokon, ili diris al la ĉaristo: "Donu al ni la rekompencon." La ĉaristo respondis: "Nenion." Unu el la viroj insistis: "Do donu al ni la nenion." La alia viro diris kun rido: "Li ja ne volas rekompenci nin. Do kial vi ankoraŭ obstinas?" La postulanto respondis: "Li ja promesis al ni la nenion, do li devas rekompenci nin per tio." La alia viro diris: "'Nenio' estas nur abstrakta vorto, sed ne konkreta objekto."



## 57. Flati la Prestiĝulon

Iam estis riĉa prestiĝulo. Ĉiuj liaj subuloj estimis lin por gajni lian favoron. Kiam li elsputis kraĉaĵon, ili konkure forviŝis la malpuraĵon per piedoj.

Malsaĝa subulo ankaŭ volis flati la prestiĝulon, tamen li trovis nenian ŝancon por tio. Li do diris al si mem: "Se la prestiĝulo kraĉis sur la teron, ĉiuj piede forviŝis la kraĉaĵon. Do mi devas fari tion la unua tuj kiam li ĝin elbuŝigos."

Kiam la prestiĝulo estis kraĉonta, la malsaĝulo levis sian piedon kaj tretis lian buŝon. Pro tio li vundis la lipojn kaj dentojn al la prestiĝulo.


La prestiĝulo demandis la malsaĝulon: "Pro kio vi intence piedbatis min je la buŝo?" La malsaĝulo respondis: "Se via kraĉaĵo falus sur la teron, la flatemuloj piede forviŝus ĝin. Kvankam ankaŭ mi volis tiel agi, tamen mi neniam trovis ŝancon por tio. Do por gajni vian favoron mi volis piede forviŝi la kraĉaĵon apenaŭ vi pretis elkraĉi."



## 58. Dividi la Heredaĵon


Iam en iu regno vivis nobelo. Li suferis de grava malsano, kaj estis mortonta. Li do ordonis la du filojn: "Post mia forpaso vi dividu la heredaĵon laŭdece." La filoj obeis lin, kaj dividis la heredaĵon tuj post lia morto. Sed la pliaĝa frato plendis, ke la malpliaĝa faris tion ne egale.

Stulta maljunulo alvenis kaj proponis al ili: "Mi havas bonan metodon por ke vi dividu la havaĵon tute egale. Duigu ĉion el la heredaĵo. Kiel vi faru tion? Vi duigu ĉiun el la vestaĵoj, duigu ĉiun el la teleroj kaj boteloj, duigu ĉiun el la pelvoj kaj urnoj, kaj ankaŭ duigu ĉiun el la moneroj. Tiel vi duigos la heredaĵon tute egale."



## 59. Rigardi la Botelfaradon

Iam antaŭe, du viroj vizitis metiiston de argilaĵo, kaj tie rigardis lin fari botelon per turnilo. Unu el ili foriris al festeno post nelonge, kaj akiris bongustan manĝaĵon kaj ankaŭ monon. La alia restis por daŭre rigardi. Li diris al si mem: "Mi iru post kontentiĝo de la rigardo." La tempo forpasis iom post iom, kaj la suno jam subiĝis, tamen li ankoraŭ ne kontentiĝis de la rigardo. Pro tio li perdis la bonŝancon por la manĝaĵo kaj mono.




## 60. Ombro de Oro

Iam antaŭe, malsaĝulo iris al granda cisterno, kaj hazarde vidis ombron de oro en la akvofundo. Li do kriis, ke troviĝas oro en la akvo. Li tuj enakviĝis kaj ekfosis en la ŝlimo por trovi la oron. Sed anstataŭ ĝin trovi, li laciĝis de tio kaj devis eliri por ripozi. Sed kiam la akvo reklariĝis, la ora ombro denove aperis en la akvo. Li do denove enakviĝis por daŭrigi la serĉadon, kaj ĉifoje ankoraŭ trovis nenion.

Tiam lia patro venis al li. Vidinte tion, li demandis la filon: "Kion vi faras, ke vi estas tiel laca?" La filo respondis: "Estas oro en la akvofundo! Mi enakviĝis kaj serĉis ĝin en la ŝlimo, sed trovis nenion ĝis mia elĉerpiĝo!"


Pririgardinte la ombron en la akvofundo, la patro eksciis, ke la oro estas sur arbo, kaj nur ĝia ombro respeguliĝis en la akvo. Li do diris al la filo: "Kompreneble birdo portis ĝin sur la arbon." La filo do grimpis sur la arbon laŭ lia propono kaj vere trovis la oron.



## 61. La Kreaĵo de Brama Disĉiplo

Ĉiuj bramanoj kredas, ke Bramo estas la patro de la mondo. Li kreis ĉion en la universo, kaj estas la nura reganto de la mondo. Iu el liaj disĉiploj diris: "Ankaŭ mi povas krei ĉion." Li estis sufiĉe malsaĝa, tamen li pretendis, ke li estas plena de saĝo. Li diris al Bramo: "Ankaŭ mi volas ĉion krei." Bramo respondis al li: "Ne tiel pensu. Vi ne kapablas tion fari."

La disĉiplo do ekagis sen konsento de Bramo.Vidinte la kreaĵon de la disĉiplo, Bramo diris: "Vi modelis la homan kapon tro granda, dum la kolon tro maldika; la manojn tro grandaj dum la brakojn tro mallongaj; la piedojn tro malgrandaj dum la kalkanojn tro grandaj, simile al tiuj de demono."



## 62. Manĝi Fazanaĵo por Resaniĝo

Iam antaŭe, iu suferis de grava malsano. Kuracisto ekzamenis lin kaj diris, ke li manĝu fazanaĵon por resaniĝi. La malsanulo do aĉetis fazanon en la bazaro, sed finmanĝinte ĝian viandon, li ne plu manĝis aliajn fazanojn.


Poste, kiam la kuracisto vidis la malsanulon, li demandis: "Ĉu vi jam resaniĝis?" La malsanulo respondis: "Vi ordonis, ke mi manĝu fazanaĵon. Do mi finmanĝis unu fazanon, sed ne aŭdacis manĝi pliajn."

La kuracisto riproĉis lin: "Se vi jam manĝis unu, pro kio vi ne manĝu pliajn? Ĉu vi povas resaniĝi je nur unu fazano?"



## 63. Teruriĝo pro la Kostumo de Demono

Iam vivis pluraj aktoroj. Ili kune vojaĝis al alia loko por sin savi de la serioza malsatego. Kiam ili preteriris montaron, en kiu onidire loĝas demonoj ferocaj kaj sangavidaj, ili devis halti por tranokti. La aktoroj bruligis fajron, kaj kuŝiĝis ĉe ĝi por forpeli froston. Tiam iu el ili sentis malvarmon, li do sin vestis per teatra kostumo, per kiu oni rolas hommanĝan demonon, kaj sidiĝis ĉe la fajro por sin varmigi. Iu alia vekiĝis, kaj tuj teruriĝis kiam li vidis iun en demona kostumo. Anstataŭ atente ririgardi la vidaĵon, li forkuris senprokraste pro timego. Tio vekis la aliajn, kaj ili ĉiuj forkuregis, lin sekvante. La aktoro en la teatra kostumo ankaŭ teruriĝis de tio, kaj ekkuris post siaj kamaradoj. Vidante lin, la aliaj opiniis, ke la demono postkuras por kapti ilin, do ili des pli teruriĝis. Ili kuregis senĉese preter montoj, tra riveroj, kaj trans kanaloj. Ilia korpo vundiĝis, kaj ili elĉerpiĝis morte. Nur je la tagiĝo ili komprenis, ke postkuris ilin ne la hommanĝa demono, sed vivanta homo.




## 64. Luktado kun la Imagita Diablo

Iam estis forlasita domo. Laŭdire en ĝi estis kruela demono, do neniu aŭdacis eniri.

Tiam, viro pretendis esti kuraĝa, kaj diris: "Mi volas tranokti en la domo." Dirinte, li tuj endomiĝis sin kuraĝiginte.

Poste, alia viro pretendis esti multe pli kuraĝa ol la antaŭa, li ankaŭ volis iri en la domon. Apenaŭ li provis malfermi la pordon, la unua viro opiniis, ke alvenas la demono. Li do forte puŝis la pordon, por ke ĝi ne malfermiĝu. La dua viro ankaŭ opiniis, ke en la domo estas la demono. Li do volis malfermi la pordon perforte. Tiel ili luktadis pri la pordo ĝis tagiĝo. Nur kiam ili intervidiĝis unu al la alia, ili eksciis, ke neniu estas la demono, sed vivanta homo.




## 65. Kvincent Kneloj

Iam estis virino diboĉema kaj volupta. Ŝi malŝatis sian edzon, kaj volis mortigi lin laŭeble. Ŝi provis multajn metodojn por tio, tamen neniam sukcesis.

Kiam ŝia edzo estis vojaĝonta al la najbara lando kiel sendito, malica ideo subite venis en la kapon de la virino. Ŝi miksis venenon en knelojn por mortigi lin. Ŝi mensogis al li: "Nun vi iros malproksimen. Timante, ke mankus al vi manĝaĵo, mi speciale faris kvincent knelojn por vi manĝi. Sed tamen, ne manĝu ilin antaŭ ol vi havos nenion alian por manĝi en la alia lando."

La edzo obeis ŝin, kaj manĝis neniom el la kneloj ĝis li atingis la alian landon. Kiam li tranoktis en arbaro, li sin kaŝis sur arbo por eviti sovaĝajn bestojn, sed forgesis pri la kneloj, kaj lasis ilin sub la arbo.



Tiu nokte hazarde okazis priŝtelado. Kvincent ŝtelistoj ankaŭ venis en la arbaron priŝtelinte trezorojn kaj kvincent ĉevalojn de la reĝo. Ili ĉiuj estis kaj malsataj kaj soifaj pro la kurego. Vidinte la knelojn sub la arbo, ili manĝis po unu, kaj pro tio ĉiuj mortis de veneniĝo.

La viro ascendis de la arbo ĉe la tagiĝo kaj vidis, ke ĉiuj ŝtelistoj kuŝas mortaj sub la arbo. Li do afekte vundis la kadavrojn per tranĉilo kaj sagoj. Poste, li kolektis la trezorojn, kaj pelis la ĉevalojn al sia celloko. La reĝo de la lando postkuris la ŝtelistojn kun multaj homoj laŭ la piedsignoj, kaj renkontis lin sur la vojo.

La reĝo demandis lin: "Kiu vi estas? Kaj de kie vi havigis al vi la ĉevalojn?" Li respondis: "Mi venis de alia lando, kaj renkontis la ŝtelistojn sur la vojo. Mi luktis kun ili kaj mortigis ilin ĉiujn. Tiel mi prenis la ĉevalojn, kaj trezorojn por iri al vi. Se vi ne kredas pri tio, bonvolu iri kaj kontroli iliajn vundojn, kaj ankaŭ la luktejon, kie ili mortis."

La reĝo tuj sendis fidelulojn por pririgardi, kaj trovis tion vera. La reĝo do admiris lin pri tio. Kiam la reĝo revenis al sia lando, li donacis al li per alta rango, multaj trezoroj kaj larĝa kampo.

Tiam la malnovaj korteganoj ĵaluzis lin pri tio. Ili diris al la reĝo: "Li ja estas alilandano nefidinda. Kiel vi povis donaci al li tiel altan rangon, multe pli altan ol tio de la malnovaj korteganoj?"

Informiĝinte pri tio, la sendito diris: "Kiu estas sufiĉe brava por dueli kun mi? Bonvolu iri al la ebena loko por montri nian propran kapablon." Ĉiuj korteganoj timis, kaj neniu el ili aŭdacis dueli kun li.


Poste, en la landon venis feroca leono. Ĝi manĝadis homojn sur la vojo al la ĉefurbo, kaj pro tio neniu aŭdacis iri pretere. Tiam la korteganoj kune interkonsiliĝis: "La alilandano diris, ke li estas senkompare brava kaj neniu povas lin venki. Se li povos mortigi la leonon por sekurigi la popolanojn, do tio estos vera miraklo." Poste, ili faris proponon al la reĝo. La reĝo donacis tranĉilon kaj bastonon al la sendito, kaj ordonis lin mortigi la leonon.

Akceptinte la ordonon, la sendito iris al la leono sin kuraĝiginte. Kiam la leono vidis lin, ĝi hurlegis feroce kaj sin ĵetis sage al li. Li ektimis, kaj senprokraste grimpis sur arbon. La leono do levis la kapon al la arbo kun malfermita faŭko. Li estis tiel timigita, ke li perdis la tranĉilon el la mano. Sed la tranĉilo falis ĝuste en la faŭkon de la leono, kaj ĝin mortigis. Li ekzaltiĝis de tio, kaj tuj revenis al la reĝo. La reĝo do despli ŝatis lin. Tiam, ĉiuj en la lando laŭdis kaj respektis la senditon.

## 66. Reciti Stirmetodon

Iam estis filo de prestiĝa riĉulo. Li iris al la maro kun multaj komercistoj por serĉi trezorojn. Li scipovis parkere reciti la stirmetodon de la ŝipo kaj sciis bone, kiel oni stiru, direktu aŭ haltigu la ŝipon en la kirlaĵoj aŭ ondegoj sur la maro. Do li fanfaronis al la aliaj: "Mi bone scias surmaran stirmetodon." Aŭdinte tion, ĉiuj lin kredis.

Ne longe post kiam ili ekveturis sur la maro, la stiristo mortis de malsano, do la filo de la prestiĝulo fariĝis nova stiristo por lin anstataŭigi. Kiam la ŝipo venis en la kirlaĵon, la nova stiristo recitis laŭte: "Oni devas tiel stiri, kaj tiel direkti la ŝipon." Sed la ŝipo nur turniĝis en la kirlaĵo, kaj neniom povis moviĝi. Do antaŭ ol la komercistoj atingis la trezorejon, ili ĉiuj dronis kune kun la ŝipo.



## 67. La Lasta kuko

Iam antaŭe, paro da geedzoj havis tri kukojn. Post kiam ili ambaux manĝis po unu, restis nur la lasta kuko. Do ili interkonsentis: "Kiu parolos unue, tiu ne rajtos manĝi la kukon." Pro tio, neniu el ili ekparolis plue.

Momenton poste, rabisto entrudiĝis por prirabi ilin, kaj forportis ĉiujn havaĵojn. Sed la geedzoj nur gapis silente pro la antaŭa interkonsento. Vidinte tion, la rabisto ekatencis la edzinon ĝuste antaŭ la edzo. Kvankam la edzo vidis tion, li ankoraŭ sin tenis silenta.

La edzino do ekkriis pri la rabisto, kaj riproĉis la edzon: "Malsaĝulo! Kial vi ne kriu pri la rabisto pro la kuko? "

La edzo aplaŭdis per la manoj, kaj diris kun rido: "Virinaĉo! Jen mi havos la kukon, kaj donos al vi neniom."


Kiam oni informiĝis pri tio, neniu el ili povis sin deteni de rido.



## 68. Sin Venĝi

Iam antaŭe, viro iun malamegis, kaj afliktiĝis de tio tagnokte. Aliulo demandis lin: "Pro kio vi tiel afliktiĝas?" Li respondis: "Iu atencis min, kaj mi ne kapablas min venĝi. Mi ne scias, kiel mi povos lin atenci. Mi afliktiĝas ĝuste pro tio."

La aliulo respondis: "Nur per iuspecaj sorĉvortoj vi povos atenci lin. Sed estas manko de la sorĉarto. Antaŭ ol ekatenci lin, vi jam suferos de tio." Aŭdinte la respondon, la viro ekĝojis kaj petis: "Bonvolu instrui min pri la sorĉvortoj. Kvankam mi suferos de tio, mi preferu atenci lin."



## 69. Rapida Manĝado

Iam antaŭe, iu vojaĝis de la nordo al la sudo en Hindio. Li loĝis tie longe, kaj prenis lokan knabinon kiel sian edzinon. Apenaŭ la edzino pretigis manĝaĵon por li, li ekenglutegis haste spite al varmego.

La edzino miris pri tio kaj demandis: "Ĉi tie estas neniu rabisto prirabi vin. Pro kio vi manĝas tiel rapide anstataŭ konvene?"

Li respondis: "Tio estas sekreto. Mi ne povas diri al vi." Aŭdinde pri tio, la edzino des pli miris, kaj insistis pri la demando.

La edzo respondis post longa paŭzo. Li diris: "Ekde mia avo ni havas metodon por manĝi rapide. Nun mi imitas tion kaj manĝas haste."



## 70. Gustumi Mangojn

Iam riĉa prestiĝulo sendis sian serviston al alies ĝardeno por aĉeti mangojn. Li ordonis: "Vi devas aĉeti la dolĉajn kaj bongustajn." La servisto obeis lin, kaj iris kun mono al la vendisto.


La vendisto diris: "Ĉiuj miaj mangoj de tiu ĉi arbo estas dolĉaj kaj bongustaj. Neniu el ili estas malbongusta. Bonvolu gustumi kaj vi bone scios pri tio."

La aĉetanto respondis: "Mi devas gustumi ĉiujn antaŭ la aĉeto. Se mi gustumos nur unu, kiel mi povos scii, ke la aliaj estas ankaŭ same bongustaj?" Li do gustumis ĉiujn kaj portis ilin hejmen. Kiam la riĉulo vidis la mordsignojn, li sentis naŭzon, kaj forĵetis ĉiujn mangojn eksteren.



## 71. Blindiĝo pro la Edzinoj

Iam iu prenis al si du edzinojn. Se li proksimiĝis al unu, la alia koleris. Ne povante ĉesigi ilian konfliktadon, li do devis kuŝi surdorse meze de ili en la nokto. En iu pluvega nokto, lia domo likis, kaj la akvo kaj koto falis en liajn okulojn. Pro la antaŭa interkonsento, li ne aŭdacis sin movi por eviti tion, do li blindiĝis pro la malpuraĵo en siaj okuloj.



## 72. Buŝo da Milio

Iam antaŭe, iu vizitis la hejmon de sia bopatro, kaj vidis sian edzinon pistanta milion. Li do iris al ŝi kaj ŝtele metis miliograjnojn en la buŝon. Kiam lia edzino parolis al li, li ne povis respondi kun milio en la buŝo. Pro honto antaŭ la edzino, li ankaŭ ne aŭdacis eligi la milion. Li do povis fari nenion ol teni sin muta.

Vidinte lin muta, la edzino palpis lin kaj certigis al si, ke lia buŝo ŝveliĝis. Ŝi do raportis al sia patro: "La buŝo de mia edzo subite ŝveliĝis tiel, ke li eĉ ne povas paroli."


La bopatro haste alvenigis kuraciston. La kuracisto diris: "Tio estas plej grava malsano. Li povos resaniĝi nur se mi disfendos lian buŝon." Do la kuracisto disfendis lian buŝon per tranĉilo. Je tio, la miliograjnoj fluis el lia buŝo, kaj oni malkovris lian ŝteladon.



## 73.Mensogo pri la Ĉevalo

Iam malkuraĝulo partoprenis en milito sur la nigra ĉevalo kune kun aliaj batalantoj. Sed dum la milito li ektimis, kaj ne aŭdacis batali plue. Li do ŝmiris sian vizaĝon per malpuraĵo, kuŝiĝis inter kadavroj kaj sin ŝajnigis morta. Lia ĉevalo estis forkondukita de iu alia. Kiam la batalantoj foriris, li volis reveni hejmen. Li do detranĉis la voston de blanka ĉevalo, kaj portis ĝin kune kun si.

Kiam li revenis, oni demandis al li: "Kie estas via ĉevalo? Pro kio vi revenis sola?" Li respondis: "Mia ĉevalo jam mortis, kaj mi alportis nur ĝian voston." Oni demandis: "Via ĉevalo ja estis nigra, do pro kio ĝia vosto estas blanka?" Li povis respondi nenion kontraŭ tio. Oni do mokis lin pro lia malkuraĝo.



**74. Evito de Puno**

Iam la reĝo publikigis leĝon, ke ĉiuj bramanoj kaj aliaj religianoj en lia regno devu sin lavi puraj; se ne, oni skurĝos aŭ punos ilin per peza laboro.

Iu bramano portis vakan akvujon kaj pretendis sin pure lavita. Kiam iu verŝis akvon por li, li forverŝis ĝin dirante: "Mi ne lavu plue. Lasu la reĝon lavi por si mem."

Por eviti la punon de la peza laboro laŭ la leĝo, li pretendis sin pura, sed fakte li tute ne sin lavis.



### 75. Perdo de Ambaŭ Urno kaj Kamelo

Iam antaŭe, iu metis grenon en urnon. Lia kamelo etendis sian kapon en la urnon por manĝi la grenon, sed ne plu povis ĝin eligi. Ankaŭ la homo povis fari nenion kontraŭ tio. Li do dronis en granda ĉagreno.

Tiam maljunulo venis al li kaj proponis: "Ne ĉagreniĝu. Mi instruu vin, kion vi faru. Obeu min, kaj vi povos elpreni la kamelan kapon. Vi devas detranĉi ĝian kapon unue, kaj la kapo elurniĝos per si mem poste."

La posedanto de la kamelo do dekapigis la kamelon per tranĉilo laŭ la maljunulo. Tiel li mortigis la kamelon, kaj ankaŭ devis rompi la urnon por elpreni la kamelan kapon. Ĉiuj priridis lian malsaĝon.



## 76. Aspiro al la Reĝidino

Iam antaŭe, kiam kamparano promenis en la ĉefurbo, li vidis, ke la reĝidino estas eksterordinare ĉarma. Li do aspiris al ŝi tagnokte, kaj neniel povis sin deteni de tio. Li deziregis kontaktiĝi kun ŝi, sed povis trovi nenian metodon por realigi sian deziron. Pro tio li vakskoloriĝis, kaj eksuferis de grava malsano.

Kiam liaj parencoj kaj amikoj informiĝis pri tio, ili vizitis lin, kaj demandis pri la kaŭzo de la malsano.

Li respondis: "Mi vidis la ĉarman reĝidinon antaŭ nelonge, kaj deziregis kontaktiĝi kun ŝi. Sed mi ne povis elpensi bonan metodon por tio, do mi malsaniĝis pro ĉagreno. Se mia deziro ne realiĝos, mi ne povos vivi plue."

La amikoj diris: "Ni elpensu bonan metodon por realigi vian deziron. Ne turmentiĝu pri tio." Tagon poste, ili revenis al li kaj diris: "Ni jam kontaktiĝis kun la reĝidino por vi, tamen ŝi ne konsentis pri via deziro."

Aŭdinte tion, la kamparano ekridis kun ĝojo. Li diris, ke li certe povos havigi ŝin al si mem.



## 77. Melki Virazenon

Iam en izolita lando malofte vidiĝis azeno. Oni nur aŭdis, ke la azena lakto estas bongusta, tamen neniu el ili gustumis. Poste, kiam iu havigis al si virazenon, ĉiuj konkure kaptis ĝin por la lakto. El ili iuj kaptis la piedojn; iuj kaptis la orelojn; iuj kaptis la voston; kaj iu eĉ kaptis la penison. Ĉiu el ili deziregis melki ĝin kaj gustumi la lakton unua. Tiu, kiu kaptis la azenan penison, opiniis, ke tio estas la mamo. Li do forte premadis ĝin por elfluigi lakton. Sed neniom da lakto elfluis ĝis ilia elĉerpiĝo. Ili do klopodis vane kun nenia rikolto, kaj estis mokitaj de la aliaj.



## 78. Hastema Filo

Iam patro diris al sia filo dum nokto: "Morgaŭ ni iru kune al la vilaĝo por preni ion de tie."

Aŭdinte tion, la hastema filo iris al la vilaĝo sola sen scio de sia patro en la sekva mateno. Atinginte la cellokon, li elĉerpiĝis de la longa irado, sed tute ne sciis, kion li prenu de tie. Kaj krome, kun nenio por manĝi, li preskaŭ mortis de malsato kaj soifo.

Li do povis fari nenion alian ol reveni al sia patro.


Vidinte lin reveninta, la patro kulpigis lin: "Kiel malsaĝa vi estas! Pro kio vi iris sola sen mi kaj klopodis vane? Pri tio oni mokos vin."



## 79. Porti Benkojn por la Reĝo

Iam antaŭe, reĝo volis iri en Senĉagrenan Ĝardenon por sin amuzi. Li ordonis al sia subulo: "Prenu benkon al la ĝardeno, por ke mi ripozu sur ĝi."

La subulo hontis tion fari, li do respondis al la reĝo: "Mi ne kapablas porti permane. Mi preferas porti ĝin dorse." La reĝo do ordonis, ke oni metu tridek ses benkojn sur lian dorson, ke li portu ilin al la ĝardeno. Pro tio la subulo estis mokita de aliaj.




## 80. Klistero

Iam iu suferis de interna malsano kaj konsultis kuraciston. La kuracisto diris, ke li devas kuraci lin per klistero. Dirinte, li ekpreparis la medicinaĵon kaj klisterilojn por la malsanulo.

Sed antaŭ ol la kuracisto revenis, la malsanulo englutis la preparitan medicinaĵon. Pro tio lia ventro ŝveliĝis, kaj suferigis lin multe. Li neniel povis elporti tion plue.

Reveninte, la kuracisto miris, kaj demandis al la malsanulo: "Kio okazas al vi? "La malsanulo respondis: "Mi englutis la medicinaĵon por klistero, kaj suferas de tio neelporteble."

La kuracisto riproĉis lin: "Vere malsaĝa vi estas! Vi tute ne scias, kiel oni prenu ĝin." Li ordonis la malsanulon preni alian medicinaĵon senprokraste. Iom poste, la malsanulo resaniĝis post vomado.




## 81. Venĝo Kontraŭ la Urso

Iam patro kaj filo vojaĝis kune kun aliaj. Kiam la filo enarbariĝis sola, urso mordis lin kaj per ungoj vundis lin. Li do rapide elkuris al la akompanantoj.

Vidinte la vundon de la filo, la patro ekmiris kaj demandis lin: "Kio okazis al vi?" La filo respondis al la patro: "Besto kun longa hararo vundis min."

La patro do iris kun la akompanantoj en la arbaron kun pafarko kaj sagoj. Vidinte feon kun longa hararo, li levis la pafarkon. La aliaj diris al li: "Pro kio vi pafos lin? Li ja neniun atencas. Vi devas puni nur la suferiginton de via filo."




## 82. Semi Tritikon

Iam kamparano iris al alies kampo. Vidinte, ke tritiko kreskas tre bone, li demandis ĝian mastron: "Kiamaniere vi plantis la tritikon tiel bone?"

La mastro respondis: "Mi ebenigis la kampon kaj aldonis sterkon antaŭ la semado. Pro tio la tritiko kreskas bone." La kamparano ekagis laŭ la instruo. Ebeniginte kaj sterkinte la kampon, li pretis semi. Tiam li ektimis, ke li tretus la kampon malmola kaj pro tio la tritiko ne kreskus bone. Li do elpensis metodon: "Estus pli bone, ke mi semu tritikon sidante sur lito portata de aliuloj."

Li do dungis kvar virojn por tio. La viroj tenis la liton respektive je ĝia piedo, kaj li semis sidante sur ĝi. Sed la kampo des pli malmoliĝis sub tretado de la 4 viroj. Oni priridis lin pro tio.



## 83. Venĝo de Simio

Iam simio estis batita de plenaĝuloj, sed ĝi ne aŭdacis sin venĝi kontraŭ ili, ĝi do verŝis sian koleron sur la infanojn.




## 84. Bati Hondojn pro la Luna Elipso

Iam antaŭe, kiam la reĝo de demonoj vidis, ke la luno estas tre brila, li ŝirmis ĝin per sia mano. Sed sensciuloj atribuis la malheliĝon de la luno al senkulpaj hundoj kaj batis ilin pro tio.



## 85. "Doloro nur pro la okuloj"

Iam antaŭe, virino suferis de okuldoloro. Ŝia konatino demandis ŝin: "Ĉu vi suferas de okuldoloro?" La suferantino respondis: "Jes, mi suferas de okuldoloro." La konatino diris: "Oni havas okulojn. Ili certe doloras. Kvankam mi ankoraŭ ne eksuferas de okuldoloro, mi volas elfosi ilin por eviti la eventualan doloron." La aliaj admonis ŝin: "Se vi havas okulojn, ili jen doloras jen ne; se vi perdus la okulojn, vi suferos de doloro dum la tuta vivo."



## 86. Protekti Orelringojn

Iam patro kaj filo iris sur vojo. Subite ili renkontis rabiston, kiu pretis prirabi ilin. La filo portis orajn orelringojn, do la patro timis, ke la rabisto forprenos ilin. Li ektiris la orelojn de la filo. Sed la oreloj ne povis tuj disiĝi je lia tiro. Li do detranĉis la kapon de la filo por protekti la orajn ringojn. Poste, kiam la rabisto foriris, li provis remeti la detranĉitan kapon, sed neniel sukcesis. Ĉiuj priridis la malsaĝan patron pro tio.



## 87. Dividi la Ŝtelaĵon

Iam antaŭe, aro da ŝtelistoj priŝteladis kune kaj havigis al si multajn objektojn. Ili do dividis la havaĵon laŭrange. Iu altvalora teksaĵo ŝajnis ne bone kolorigita, do ili ĝin opiniis ne valora kaj donis al tiu plej malaltaranga. La malsuperulo akceptis la dividaĵon kun malĝojo. Li plendis, ke li malprofitas de tio. Sed kiam li vendis la teksaĵon en bazaro, riĉulo en urbo pagis multe. Li enspezis pli multe ol la aliaj, kaj ekzaltiĝis de tio.



## 88. Simio kaj Sojfaboj

Iam simio portis manplenon da sojfaboj kun si, sed pro malatento li perdis unu. Li do metis la restajn sojfabojn sur la teron por serĉi la perditan. Sed li ne trovis la perditan, eĉ la restaj sojfaboj estis formanĝitaj de kokoj kaj anasoj.



## 89. Ora Putoro


Iam viro promenis sur vojo kaj trovis oran putoron. Li prenis ĝin en sian sinon kun granda ĝojo, kaj daŭrigis sian vojadon. Kiam li venis al rivero kaj demetis siajn vestojn por trapasi la riveron, la putoro aliformiĝis en venenan serpenton. Sed la viro pensis: "Mi preferu morti de la serpento ol forlasi ĝin." Pro lia firma volo, la serpento denove sin ŝanĝis en oron.

Ĉe la vojo malsaĝulo vidis, kiel la serpento sin ŝanĝas en oron. Li do opiniis, ke serpento ĉiam povas fariĝi oro. Li kaptis serpenton kaj metis ĝin en sian sinon, sed perdis la vivon pro mordo de la serpento.




## 90. Malriĉulo kaj la Trovita Mono

Iam malriĉulo trovis saketon da ormoneroj en sia piedirado. Li do tuj ekkalkulis ilin kun granda ĝojo. Sed antaŭ ol li finis la kalkuladon, la perdinto alvenis kaj forprenis la monon. Tiam la malriĉulo pentis, ke li devus foriri senprokraste kun la mono. Pro tio li dronis en granda afliktiĝo.



## 91. Revo de malriĉulo

Iam antaŭe, vivis malriĉulo kun tre malmulta posedaĵo. Vidinte, ke riĉuloj posedas tre multe, li do revis esti tiel riĉa kiel ili. Sed, lia posedaĵo tute ne povis kompariĝi kun la ilia, kiom ajn li faris ŝparadon kaj akumuladon. Li do furiozis kaj volis ĵeti la posedaĵon en riveron. La aliaj admonis lin: "Kvankam via posedaĵo estas malmulta, tamen per ĝi vi povas daŭrigi vian vivon dum kelkaj tagoj. Kial vi forĵetos ĝin en la akvon?"



## 92. Knabo kaj Knelo

Iam patrino piediris kun sia mamsuĉa infano en la sino. Laciĝinte de la vojirado, ŝi kuŝiĝis ĉe la vojo kaj endormiĝis profunde. Tiam homo venis al la infano kaj donis al li knelon. Ricevinte ĝin, la infano estis ravita de la bongustaĵo, kaj ne plu zorgis pri siaj ornamaĵoj. La homo do demetis liajn arĝentan seruron, perlan kolringon kaj vestaĵojn, kaj forportis ĉion de ili.



## 93. Maljunulino kaj Urso

Iam maljunulino kuŝis sub arbo. Alvenis urso kaj volis ŝin kapti. La maljunulino do kuris ĉirkaŭ la arbo por sin savi. Tiam la urso ŝin postkuris, kaj kun unu hufo sur la arbo, ĝi volis ŝin kapti per la alia. Subite, genia ideo venis al la maljunulino. Ŝi do tuj ĉirkaŭprenis la arbon, kaj premis la antaŭajn piedojn de la urso al la arbo. Pro tio la urso ne plu povis sin movi. Ĝuste tiam alvenis alia homo. La maljunulino do kriis: "Helpu min kapti la urson, ke ni mortigu ĝin kaj dividu la viandon." Tiu homo kredis la maljunulinon, kaj vere kaptis la urson. La maljunulino senprokraste forkuris, sed la homo estis embarasigita de la urso.




### 94. kanalo "Mani"

Iam iu adultis kun alies edzino. Antaŭ ol ili finis sian aferon, la edzo revenis de ekstere kaj trovis ilian konduton. La edzo do atendis ĉe la pordo por mortigi la adultanton post lia elĉambriĝo. La virino diris al la adultanto: "Jen mia edzo trovis nian aferon. Ni ne havas alian elirejon. Vi nur povas eliri tra la 'mani' ". Ŝi aludis, ke la adultanto elglitu tra la kloaka kanalo.

Sed la adultanto miskomprenis tion kiel la magian kaj altvaloran Mani-perlon. Li ekserĉis, sed nenie povis trovi ĝin. Li do ĵuris: "Se mi ne trovos la Mani-perlon, mi neniam eliru."

Momenton poste, li estis mortigita de la edzo.



## 95. Rakonto pri Gekolomboj


Iam antaŭe, paro da kolomboj vivis kune en sia nesto. Kiam beroj maturiĝis en aŭtuno, ili plenigis sian neston per la beroj. Sed poste, la kolektitaj beroj iom post iom malmultiĝis pro sekiĝo, kaj ĝisfine restis nur duono.

La virkolombo koleriĝis kaj kulpigis la kolombinon: "Ni kune kolektis la berojn kun granda peno. Kial vi sola manĝis ilin, ke restas nur duono?"

La kolombino respondis: "Mi ne manĝis la berojn. Ili malmultiĝis per si mem."

La virkolombo ne kredis tion. Ĝi furioziĝis kaj refutis: "Se vi ne manĝis, kiel la beroj povus malmultiĝi per si mem?" Ĝi do mortigis la kolombinon per sia beko.

Ekpluvis post pluraj tagoj. La beroj malsekiĝis, kaj pligrandiĝis ĝis la antaŭa multeco. Vidinte tion, la vira kolombo ekpentis: "Ŝi fakte neniam ŝtele manĝis berojn. Ŝin mi miskulpigis kaj erare mortigis." Ĝi do triste vokadis la kolombinon: "Kien vi iris, mia kara? "



## 96. Falsa Blindulo

Iam antaŭe, metiisto laboris por reĝo. Kiam li ne plu povis elteni la pezan laboron, li sin ŝajnigis blinda kaj liberigis de tio. Kiam iuj aliaj metiistoj informiĝis pri la afero, ankaŭ ili volis sin blindigi por eviti la pezan laboron. Saĝulo admonis ilin: "Kiel vi volas suferigi vin vane? "

Tiaj malsaĝuloj estas mokitaj de aliaj.



## 97. Perdo de Ambaŭ Vesto kaj Ormonero

Iam antaŭe, du viroj piediris en dezerto. Sur la vojo ili renkontis rabiston. Iu el ili surportis kotonan vestaĵon, kaj ĝi estis forprenita de la rabisto. La alia do sin kaŝis en herbaron.

La prirabito iam metis ormoneron en la vestaĵan kolumon. Li do petis la rabiston: "La vestaĵo valoras je ormonero. Mi aĉetu ĝin per mono."

La rabisto demandis: "Kie estas via mono?"

La prirabito prenis la monon el la vestaĵa kolumo, kaj donis ĝin al la rabisto: "Tio ja estas el vera oro. Se vi ne kredas, bonvolu demandi la ormetiiston, kiu sin kaŝas en la herbaro."

Vidinte tion, la rabisto forprenis ankaŭ la vestaĵon de la metiisto. La malsaĝulo perdis ambaŭ vestaĵon kaj ormoneron.



## 98. Mortigi Testudon

Iam knabeto sin amuzis ĉe rivero kaj kaptis grandan testudon. Li volis ĝin mortigi, sed ne sciis kiel agi. Li do demandis al aliulo: "Kiel mi mortigu ĝin?" La viro respondis: "Metu ĝin en akvon kaj dronigu ĝin." La knabo tuj kredis la vortojn. Li metis la testudon en la akvon, sed la testudo forkuris de li senprokraste.

